

PENSEO

N-ro 253

nov. / 2012

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 23-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



kozo

io aŭ iu
 min obsedas
 inter songoj kaj vekigoj.
 ĉe forĵeto mi ektrovas
 ke fero egalas kotonon.
 kune kun kozo
 sub la ĉielo klimatizita,
 la koro restas ludema,
 nur se vento ne perfidas la sekreton.
 sango estas pli vigla ol akvo,
 spite al distanco,
 ĉu en dezerto ĉu sur marĉo.
 kamelio aŭ boato uzanta spiriton
 ĉiam troviĝas en la fulmo
 el haro-kontraŭ-haro.



Mikaelo Bronsxejn (Rusujo)




Gratuleto

Falas folioj kun hast' kalendaraj.
 Inter la tagoj rutinaj
 venas la tag' por saluti vin, karaj
 miaj bonkoraj virinoj.
 Mi kun sincera plezuro enrimas

preĝojn por via bonfarto,
 ĉar mi vin amas, adoras, estimas
 ne nur la okan de marto.
 Ja, se hazarde mi vin ne ekkonus
 dank' al feliĉa mister', do
 mia vivaĉo komplete malbonus
 inter sopiro kaj perdo.



Leieladonna (Mekskio)



Per miaj penikoj

Mi pentris vin,
 kaj dum mi faris,
 vi ekrigardis min, ridetis al mi...
 en ĉiu paŝo mi imagis vin:
 dolĉa kaj tenera, karema kaj feliĉa.
 Ŝajnis al mi malkovri vin en ĉiu paŝo,
 foje vi estis serioza,
 tiam vi denove ridetis,
 foje viaj okuloj vidis min,
 dum mi daŭris...
 Mi metis ombrojn en via vizaĝo, en via kolo,
 en via brusto...
 mi desegnis vin en mia menso,
 mi imagis vin...
 Kiel vi estus ?
 Mi pensis pri vi...
 Foje mi ridetis malice
 kaj mi vidis vin,
 foje per malfinia tenereco,

foje intrigita...
 tiu viro kun raŭka kaj vireca voĉo,
 tiel vireca, tiel galanta...
 mi vidis vian kolon, vian ĉemizon...
 mi provis esti justa en ĉiu streko,
 mia menso trompas min,
 kaj ludas pri mi,
 tiel, kiel mi faras
 ĉi tiu momento...
 mi ridetas...
 nun vi vivas ĉimomente...
 en mia arto, en mia imago...
 princo kaj reĝo...
 mia amiko...
 unu kaj multfoje mi desegnis vin,
 mi pentris vin,
 mi imagis vin...
 mi ĝuis en ĉiu streko,
 la penikoj konspiris
 kun mi,
 fariĝas miaj komplikoj,
 mi pentris vin el mil koloroj,
 mi vidis vin en lumo kaj mallumo,
 mi tuŝis viajn tutajn trajtojn,
 vian buŝon, vian nazon, viajn okulojn...
 vian animon...



Ŭel (Brazilo)



Animo

Se iel birdas
 mia animo,
 kien ĝi *flugas*?!
 Se iam al sereno
 ne ĉe mi 'stas la diveno.



Erarkorekto

En numero 252, la titolo de la poemtraduko
 “Dolĉaj misterioj de la vivo” devas legiĝi
 “dolĉaj misteroj de la vivo”.

Cindy Mckee (Usono)



Faloj kaj folioj

Aŭtune hundoj snufas la suprojn de arboj.
 Delonga deziro atingita.
 Mia folio falis somere
 sur radikojn kraŝe,
 senodore.



Mori (Usono)



Heroo

Heroo
 ne estas tiu,
 kies pafoj
 ĉiam trafas!
 Heroo
 estas tiu,
 kiu al homoj
 ne pafas!

Kiso

Prunedonu al mi
 nur unu kison
 ĝin mi redonos
 kiam ajn vi volas!
 Nur kiam...
 Nur kiam al ni mankas pano,
 aŭ malbonegas nia sano
 ni eksentas la suferojn

de alia homarano!



Siv Burell (Svedio)



*Plus kaj plus estos
minuso, kelkfoje*

Du mirindajn amikinojn havas mi
ĝojajn, spritajn, delikatajn.

Foje mi venigis ilin kune
pensante ke ili du
fariĝu mirinda du.

Sed ne, ho ne
ili ne ŝatis unu la alian
sed nur parolis kun mi
kaj tute ne unu kun al alia!
Kial okazas
ke plus kaj plus
estos minuso ?



Paŭlo Silas (Brazilo)



DE MANO AL MANO

Sin facile movas la hazardociklo.
Momentlonge fluas ĝi diversdirekten.
Ne loĝej' fiksita, sed senĉesa migro;
Sinprezent' en multaj temp-etapoj ekde

Mondkomenco, homa praformiĝo, ĝermo.
Spasmospir' pro mirkonfuz' envimalice.
Absurdaj', kuŝad' en monpotenca kerno.
Aliul' ankoraŭ plu atendovice.

Akvogut' atingas la vulkanprofundon.
Gratvundad' sur ligno trokreskigas ungon.
Radikar' montara tuŝas terocentron.

Akciprez' aĉetas l' universvakuon.
He, bonvenon! Estas vi, de ni, kliento.
Nepre mendu povon kaj sociinfluon.



Lenke Szász (Rumanujo)



RENKONTI VIN

Frostetis mi dum atendado
en la frido novembra,
atendis mi petveturilon
en vojrand' de urbo fremda.

Malvarma vento jam ekblovis,
staradis mi en frosto,
neĝeroj dance ekfaladis,
alvenis la krepusko.

Se vian urbon mi atingos,
vi kisos min en sojlo—
neĝon malvarma vento kirlis,
ridetis mi en frosto...

Ĝamadio (Germanujo)

La ĉiea ŝtormo

Blovegas la vento en griza malhelo.
Veturas boatoj sur ondo.
La tondro, la fulmo, vetera mallumo
kunigas la ŝipojn en rondo.

Ĥaoso Sentata –

ne Elparolata;
sed Ĉiam ĉeĈesta:
Ĥaoso plej Besta.

Sed unu boato ne estas en rondo,
ĝin stiras nur unu persono.
Subite nun venas grandega mar-ondo.
Ĝin ne povas mastri hom-povo.

La akvoj kaj ondoj kaj l' mondo de l' mar'
fortiras boaton, per unu stiratan,
gvidantajn ĝin ien alie.

Kaj tute hazarde kaj neatendite
ŝanĝiĝas la situacio:
Aperas nun ŝipo grandega kaj forta
gvidanta l' boatojn al hejma nacio,
sed unu el ili nun mankas.

La unu – jen tio ne gravas finfine – ne estas eĉ
valorigata.

La unu, nek age, nek vorte, nek pense nun
estas pri-rememorata.
Ĉu tion ni fine akceptu? Ĉu tio nomiĝas
rezult'?

Demandojn nur metu, Demandojn,
Demandojn – Respondojn Nur Donos
Plejmult'.

Cezar (Germanujo)



Fresĥa vento!

(por desegnaĵo de Eder Benedetti el Brazilo)

1

Kia sento,
fresĥa vento!
Flugararo
pro konsento!

Ĝoj' sen pento,
sen fi-dento,
braka paro
en la vento!

2

Jen adoro
el la koro
sur la bilda
ĝojfuroro!

Gaja horo,
bril' de oro,
fresĥa, milda,
gajhumoro.

3

Esperanto,
por ŝatanto,
vere estas
ne nur vanto.

Esperanton
desegnanto,
bunte festas
per in-kanto.



Guozhu (Ĉinujo)



Sonete al Chongfang

(2012-10-25)

1.

Mi vivas ĉiam kiel optimisto,
sen rimarko pri veno de old-aĝo.
Sed mi en-hospitaliĝis kun tristo.
Ektrafis min ja veinda domaĝo.

Mi sobre rifuzis operacion.
Prudenta cerbumado potenciĝas.
Je mejloŝtono mi havas konscion:
Viv-retrokalkulado komenciĝas.

Ĝuste tiam Chongfang, amiko kara,

direkton montras al mi kriterie.
eLibron li donacis malavara,
kiu nomiĝas <Marde kun Morrie>.

La profesoro instruas modele:
Kiel forpasi de la mondo bele?

2.

Kortuŝas tiu lasta leciono
de Morrie la mondon emocie.
Post ĝia eldoniĝo en Usono,
disvastiĝas furoro sensacie.

En tridek unu fremdlingvojn tradukoj
pretiĝas al legantar' sin-dediĉaj.
Sub konciza titolo nutro-sukoj.
Edukas la libro kun temoj riĉaj.

Dum plejparto de vasta homamaso
filistre al diboĉa lukso celas.
Avide mamonisma profit-ĉaso
publikon nun ĝis freneziĝo pelas.

Konante historion tra jarmiloj,
saĝul' komentas per ridaj babiloj.

3.

Mi estas ĉino kun nomo Eĉino,
aspiranta al honesta moralo.
Luktas vicoj da virtuloj sen fino
pionire por nobla idealo.

Sennombraj en la ĉina historio
herooj stele brilas okulfrape.
Fang Zhimin kun amo al Ĉinio
spitas flegme al mortkondamno strabe.

Chen Yi versis en danĝera momento
tri poemojn <Ĉe Monto Umefloro>.
Wen Tianxiang bravisme kun prominento
kantas pri Nobla Spirito de Koro.

Kiu povus fuĝi morto-koncerne?
Nur kor' lojala gloras por eterne!

Danke respondi al E-amikoj

(2012-10-23)

Legante leterojn de geamikoj,
mi sentas apartan surprizan ĝojon.
Ĉar en kvin-silabaj versoj predikoj
konsole montras al mi ĝustan vojon.

Ke la missorta malsano subita
nenial efiku kiel sortbato.
Kun buŝo ĉiam ride malfermita
renkonti en aplomba animstato.

Freŝaj fruktoj kaj legomoj konvene
al la damaĝita sano karesu.
Trinki pokalon da akvo matene
kiel la taskon nepre ne forgesu.

Se mi pasos trans la kavo malbona,
foriĝos de mi malsano demona.



Petro Palivoda (Ukrainio)

Silento

Literoj, vortoj, propozicioj,
ĉeestas interpunkcio,
vortordo perfekte korekta,
espero kaj ĝojo-malĝojo –
ĉio en sortimento.

En la silabinterplekto
parolas ni per silento.

dum mi aŭdas

voĉon vian
dum okulojn viajn
vidas
mi aŭdas
mi vidas

Rigardo
sunaj varmegaj okuloj
ombro de birdo sur muro
printempa aero
muziko
el mia fenestro
ŝajnas la mond'
kvarangula

Dezerto

ni iras daŭre
mortas pro soifo
ne sun karesas
pato ardigita
sur niaj langoj
vortoj sufokiĝas
oazo
ni iris daŭre
mortis pro soifo
miraĝo



Jadranka Miric (Serbujo)



SOMERO

Sunsorbata tag'.
Ekas deprenado de
troa vestaĵo.

Per ĉapeleto
blanka, el pajlo farita,
varmega salut'.

Brilas arda sun'.
Reflektiĝas dukate
en ŝprucfontano.

De ĉie aŭdiĝas
gajaj krioj portataj
per milda vento.

En branĉaroj
korusa birdpepado.
Mira kareso.

Dum aere
vastiĝas odoro de
maturaj pomoj.

Belaj inoj
kiel cidonioj tra
urbo, odoras.

Altiĝas varmo.
Sunradioj bruligas
subtilan haŭton.

Infanaj krioj.
Ĉe ŝprucfontano kaj
homoj kaj hundoj.

Ŝvitantaj homoj
per urĝaj paŝoj iras
tien alien.

Kazi Nazrul Islam (1899-1976)



Ŝtelistoj kaj rabistoj

Kiu ŝtelist' nomas vin ? amik', kiu rabist' ?
Ĉie ŝtelistoj marŝas, kaj regas rabistoj;
Ĉu ia Daniel' juĝos al ŝtelistoj;
Ĉu iu ajn sur ter' ne estas ekpluatist' ?

Plejalta juĝ' tenu sceptron ! ĉar granduloj
Nur pro ŝtelinte malfortulojn grandas.
Ju pli vastas la ŝtel', ekpluato friponas,
Des pli altas status' de l' modernaj regnoj.

Kreskas palacoj el seka sang' de premiaj
gentoj,
Profitojn altigas kapitalistoj detruante
hejmojn.
Kia fiinfera maŝin' estas ĝi nutrita per homa
karn' ?
Vivaj geviroj enen, eleniĝas rekrementa
sukerkar'.

Uzinoj elpremas el miloj da homoj l' homecon,
Por al milionuloj plenigi vinglasojn kaj
orkestojn;
Uzuriston dikventrigas manĝ' bezona je
l' malsataj;
Posedanto ruinigas hejmojn por akiri la
kaleŝon.

Negoca pens', faris de l' mond' prostituejon,
Malic' kaj Malbon' servilaj sklavo
Pokaltenante kantas al ĝi kanton de avido.

Homo perdis manĝon sanon vivon kaj esperon
Kaj parolrajton, bankrotita kuras li
Al nepra detruig'. Ne videblas eskapvojo,
Ĉar tutĉirkaŭ 'stas fosajoj instalitaj de
monavid'.

La tuta mond' 'stas karceroj, ŝtelistoj ties
provoso.
Ŝtelistoj al ŝtelist' svatiĝas,
Friponoj inter fi fratiĝas.

Kiu ŝtelist' nomas vin ? amik', diras, ke vi
ŝtelis ?
Nur kelkajn monerojn nur bovlojn vi prenis.
Sed ne ponardon vi ŝovis en homkoron.
Ne malhoma estas vi kvankam ŝtelist',
Kiel Ratnakaro vi povas iĝi Valmik', *

Se nur renkonti veran homon.

**Valmiki, la aŭtoro de fama epopeo Ramayano ,
nomiĝis fakte Ratnakaro kaj estis rabisto, legendo
rakontas pri lia renkonto kun saĝo Narado post kio li
mem fariĝis saĝo.*

Esperantigis



Roland Platteau (Francujo)



Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Ŝtono ankaŭ disfloras

—laŭ ĉinesko Jiangnanchun*

Sensente
la ŝtono
kuŝas jam longe
en ĉi sezono
aŭtuna fruktodona
sur flaveta gazono.

Jen birdo
super ĝi
flugas pretere
en gaja ari'
faligas senzorgeme
semon pro la kanta kri'.

La semo
sencele
sin ŝovas trafe
aŭ iras ŝtele

en la ŝtonan fendeton
por reviviĝi ele.

Verŝajne
ŝtona kor'
ekplenas de am'
per zorga favor'
protektas ĝin en la sin'
vartadas ĝin kun fervor'.

Forpasas
aŭtuno
sekvas la vintro.
Venas en nuno
la printempo sunplena
kun viviga fortuno.

Vekiĝas
la semo
skuas talion
kun ĝoja ĝemo
etendas sin senĝene
el la ŝtona dilemo.

La floro
en sunlum'
ridas fiere
en ŝtona brakum'
jam invitas abelojn
alflugi kun dolĉa zum'.

Ĉu fridas
la ŝtono?
Ho ne, neniam.
Kiel patrono
ĝi servas ĉiutempe,
se okazas bezono.



*Jiangnanchun (Printempo sude de rivero): ĉina

fiksforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ
rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Gratulon al Mo Yan*

—laŭ ĉinesko Haoshijin**
Ĝojiga mesaĝ'
alvenas el svedi'
ke vi jam kroniĝas
per Nobel-premi'.

Laŭdoj kune kun gloro
alsvarmas al vi
kaj l' honoro ankaŭ
iras al patri'.

Por mond-literaturo
jen kun energi'
vi verku zorgeme
bonajn pecojn pli.

La elstarajn figurojn
vi kun emoci'
kreu vivsimile
trans la tradici'.



*Mo Yan estas ĉina fama literaturo, gajninto de
Nobel-premio por literaturo 2012.

**Haoshijin (Proksimiĝas bona afero): ĉina fiksfoma
poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 56,65 / 75,65
silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x = senrima)


Viktoro (Ĉinujo)

Brave, Mo Yan!

—laŭ ĉinesko Haoshijin
Ĉinstila venko:

kamparo, vilaĝo,
mizerplena viv' kaj
popola saĝo.

Temerara kreado:
rura miraĝo
kaj riĉa imago
el cerba kaĝo.



Semo de sopiro

—laŭ ĉinesko Genglouzi*
la semo
de sopir'
ĝermas kun vesuspir'
pliiĝas
en la kor'
mordanta dolor'

ardiĝas
aspiro
amara deziro
por vidi
vin foje
babili ĝoje



*Genglouzi (kanto de akva horloĝo en nokto): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ses versoj de 33,6;33,5; / 33,6;33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xaa,xbx / xcc,xdd (x=senrima)

Sero (Ĉinujo)

Morna fiŝo

—laŭ ĉinesko Linjiangxian*
fiŝo sentas mornon
jam ne plu en river'
estas manĝaĵa prosper'
nek oksigeno
eĉ nek efemer'

poluita akvo
kvazaŭ el la infer'
rabis ĉion kun sever'
neeblas vivi—
vivi kun esper'



*Linjiang'xian (Feo ĉe rivero): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de 66,7,55 laŭ rimaranĝo xa,a,xa (x=senrima)

Mandio (Ĉinujo)


Vivi kiel lotusfloro

—laŭ ĉinesko Jianzi Mulanhua*
Kiel lotusflor'
oni devas en ag-mor'
vivi pure,
konduki bon-figure

kaj bonvirte,
dece agi malflirte,
por vantgloro
ne ĉasi kun adoro.

*Jianzi Mulanhua (mallongigita melodio magnolia): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.

Maupassant (1850-1893)



Kiom strangaj, estas tiuj malnovaj memoraĵoj, kiuj hantas vin, sen ke vi povu forigi ilin!

Tiu ĉi estas tiel malnova, tiel malnova, ke mi ne scius kompreni, kiel ĝi estas ankoraŭ tiel vigla, kaj tiel persista en mia spirito. De post mi vidis tiom sinistrajn, emociajn aŭ terurajn aferojn, ke mi miras, ke mi ne povu travivi unu tagon, unu solan tagon, ne vidante la vizaĝon de ulnjo Lamulnja, kiu desegniĝas en mia memoro, tia ke mi konis ŝin, antaŭe, jen longtempe, kiam mi havis la aĝon de dek aŭ dek du jaroj.

Ŝi estis maljuna kudristino, kiu venis unufoje semajne, ĉiujn mardojn, ripari la tolaĵon en la domo de miaj gepatroj. Miaj gepatroj loĝis en unu el tiuj kamparaj loĝejoj nomataj kasteloj, kaj kiuj estas simple antikvaj domoj havante pintajn tegmentojn, kies dependas kvar aŭ kvin farmbienoj arigantaj ĉirkaŭ.

La vilaĝo, granda vilaĝo, vilaĝego, aperis de kelkaj centoj da metroj, alpremiĝanta ĉirkaŭ la preĝejo, kirko el ruĝaj brikoj fariĝintaj nigraj pro la tempo.

Do, ĉiujn mardojn, ulnjo Lamulnja alvenis inter la sesa kaj duono kaj la sepa matene, kaj tuj supreniris al la tolaĵejo por eklabori.

Ŝi estis granda, maldika virino, barba, aŭ prefere vila, ĉar ŝi havis barbon sur la tuta vizaĝo, mirigan, neatenditan barbon, kiu kreskis per neverŝajnaj bukedoj, per frizaj tufoj, kiuj ŝajnis semitaj de frenezulo tra tiu granda vizaĝo de ĝendarmo, vestita per jupo. Ŝi havis harojn sur la nazo, sub la nazo, ĉirkaŭ

la okuloj, sur la mentono, sur la vangoj, kaj ŝiaj brovoj de ekstravagancaj denseco kaj longeco, tute grizaj, vilaj, hirtaj, aspektis kiel lipharoj lokitaj tie erare.

Ŝi lamis, ne kiel lamas la ordinaraj kripluloj, sed kiel marŝipo, kiu estas ĉe la ankro. Kiam ŝi metis, sur sian bonan gambon, sian grandan ostan kaj deviintan korpon, ŝi ŝajnis impeti kiel por grimpi monstran akvoondon, poste, subite, ŝi plonĝis kiel por malaperi en abismon, ŝi enprofundiĝis en la grundon. Ŝia marŝado ja elvokis la ideon de ŝtormo, tiom ŝi samtempe balanciĝis, kaj ŝia kapo ĉiam kapvestita per granda blanka kufo, kies rubandoj floris sur ŝia dorso, ŝajnis trapasi la horizonton, denorde alsude kaj desude alnorde, okaze de ĉiu de ŝiaj movoj.

Mi amegis tiun ulnjon Lamulnja. Tuj ellitiĝinte, mi supreniris al la tolaĵejo, kie mi trovis ŝin, sidanta; ŝi kudris, varmigilo sub la piedoj. Tuj kiam mi alvenis, ŝi trudis min ekpreni tiun piedvarmigilon, kaj sidiĝi sur ĝin, por ke mi ne malvarmumu en tiu vasta malvarma ĉambro, situata sub la tegmento.

"Tio eltiras al vi la sangon de la gorgo", ŝi diris.

Ŝi rakontis al mi anekdotojn, samtempe ke ŝi kudroriparis la tolaĵon per siaj longaj hokaj fingroj, kiuj estis viglaj, ŝiaj okuloj malantaŭ siaj okulvitroj kun grandigaj vitroj, ĉar la aĝo malfortigis ŝian vidpovon, aperis al mi gigantaj, strange profundaj, duoblaj.

Laŭgrade de mia memoro, ŝi havis laŭ la aferoj, kiujn ŝi diris al mi, kaj kies mia infana koro estis kortuŝita, bonvolan animon de kompatinda virino. Ŝi ŝveligis kaj vidis simple la aferojn. Ŝi rakontis al mi la vilaĝajn okazaĵojn, la aventuron de bovino, kiu fuĝis el stalo, kaj kiun oni retrovis, iun matenon, antaŭ la muelejo de Prospero Maletto, rigardante turni la alojn el ligno, aŭ la historion de kokinovo, kiun oni malkovris en la kirka sonorilturo, neniam komprenante, kiu besto venis ovodemeti ĝin tie, aŭ la historion de la

hundo de Johano-Johano Pilaso, kiu reprenis je dek leŭgoj de la vilaĝo la kuloton de sia mastro, ŝtelitan de pasanto, dum ĝi malsekiĝis antaŭ la pordo, post irado sub la pluvo. Ŝi rakontis al mi tiujn naivajn aventurojn tiamaniere, ke tiuj ĉi prenis en mia spirito proporciojn de neforgeseblaj dramoj, misteraj kaj grandiozaj poemoj, kaj la trovemaj fabeloj imagitaj de poetoj, kaj kiujn mia patrino rakontis al mi vespere, ne havis tiun saponon, tiun amplekson, tiun potencon de la rakontoj de la kamparanino.

Nu, iun mardon, dum mi pasigis la tutan matenon aŭskultante la ulnjon Lamulnja, mi volis denove resupreniris apud ŝi, dum la tago, post plukinte avelojn kun la domservisto, en la arbareto de Haletoj, malantaŭ la farmbieno Nigraprato. Mi memoras pri la tuto, tiel klare kiel la hieraŭaj aferoj.

Nu, malfermante la pordon de la tolajejo, mi ekvidis la maljunan kudristinon kuŝiĝantan surplanke, apud ŝia seĝo, kun la brakoj etenditaj, tenante ankoraŭ sian kudrilon per unu mano, kaj per alia unu el miajn ĉemizojn. Unu el ŝiaj gamboj, envolvita per blua ŝtrumpo, sendube la granda, kuŝiĝis sub la seĝo, kaj la okulvitroj brilis piede de la murego, malproksime, tie kie ili ruladis.

Mi forfuĝis eligante akutajn kriojn. Oni alkuris, kaj mi eksciis post kelkaj minutoj, ke ulnjo Lamulnja estis mortinta.

Mi ne sciis diri la teruran, korpreman, profundan emocijon, kiu taŭzis mian infanan koron. Mi paŝete malsupreniris en la salonon, kaj mi iris kaŝi min en malluman angulon, funde granda kaj antikva kusenfotelo, kie mi genuiĝis por plori. Mi sendube restadis tie longtempe, ĉar la nokto alvenis.

Subite oni eniris kun lampo, sed oni ne vidis min, kaj mi aŭdis miajn gepatrojn interparolis kun la kuracisto, kies mi rekonis la voĉon.

Oni ja rapide serĉis lin, kaj li eksplikis la kaŭzojn de la akcidento. Cetere nenion mi

komprenis. Poste il sidiĝis, kaj akceptis glason da likvoro kaj biskviton.

Li ĉiam parolis, kaj tion, kion tiam li diris restas kaj restos gravurita en mia animo ĝis mia morto! Mi eĉ kredis, ke mi povas rediri preskaŭ entute la terminojn, kiujn li uzis.

– Ha! li diris, la kompatinda virino! Ŝi estis mia unua paciento en tiu vilaĝo. Ŝi rompis al si gambon la tagon, kiam mi alvenis, kaj mi ne eĉ havis tempon lavi al mi la manojn, elveturiĝinte de la diliĝenco, kiam oni venis hastege serĉi min, ĉar estis grave, gravege.

Ŝi havis dek sep jarojn, kaj ŝi estis tre bela knabino, belega, belega! Ĉu ni kredus tion? Pri ŝia historio, mi neniam diris ĝin, kaj neniu krom mi kaj alia, kiu ne plu estas en la lando, neniam sciis ĝin. Nun, kiam ŝi estas mortinta, mi povas esti malpli diskreta.

En tiu epoko, ĵus venis instaliĝi, en la vilaĝegon, juna helpanta instruisto, kiu havis beletan vizaĝon kaj belan talion de suboficiro. Ĉiuj knabinoj postkuris lin, kaj li faris la disdegnulon, timegante cetere la instruiston, sian superulon, la ulĉjo Grabo, kiu ne estis bonhumora ĉiutage.

La ulĉjo Grabo jam lalorigis, kiel kudristino, la belulinon Hortensa, kiu ĵus mortis en via domo, kaj kiun oni baptis pli poste Lamulnja, post la akcidento. La helpanta instruisto rimarkis tiun belan knabinon, kiu sendube estis flatita pro ke ŝi estis elektita de tiu nevenkebla konkerinto, fine estas, ke ŝi amis lin, kaj sukcesis obteni unuan rendevuon, nokte, en la subtegmento de la lernejo, fine de kudradotago.

Do ŝi ŝajnis reveni hejmen, sed elirante el la domo de ulĉjo Grabo, anstataŭ malsupreniri la ŝtuparon, ŝi supreniris ĝin, kaj iris sin kaŝi en la fojnon, por atendi sian amsopiranton. Li baldaŭ rekuniĝis kun ŝi, kaj li ekis diri flirtaĵojn al ŝi, kiam la pordo de la subtegmento denove malfermiĝis, kaj la instruisto aperis kaj demandis:

